nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2012

## KONFERENCO DUM LA ZAMENHOF-TAGO

Madrida Esperanto-Liceo organizas nun konferencon por festi la Tagon de Esperanto (ankaŭ nomatan *Zamenhof-Tagon*) kaj samtempe la 125-an datrevenon de la naskiĝo de la lingvo, por la venonta 15-a de decembro. Ĝia titolo estos "La valoro de Esperanto kiel interkultura fenomeno" ("*El valor del esperanto como fenómeno intercultural*")

La konferenco disvolviĝos en la Centro Cultural Galileo, dum la tuta tago de la sabato, kaj ĝi estos malferma por la ĝenerala publiko. Dum la mateno la plejmulto el la prelegoj disvolviĝos en la hispana kaj temos pri diversaj aspektoj de la internacia lingvo. Vespere, oni pli celos esperantlingvan publikon, kun ĝeneraltemaj prezentadoj.

La provizora programo estas sekva:

10:30 Presente y perspectivas del esperanto a los 125 años de su aparición, José A. del Barrio.

11:30 La biblioteca digital de la Federación Española de Esperanto, Ana Manero.

13:00 El uso del esperanto en la vida familiar, Pedro Hernández Úbeda.

16:00 (en Esperanto) Komunikado kun eksterteranoj, Manuel Pancorbo.

17:00 (en Esperanto) Historio de la Ibera Duoninsulo dum la islamana regado, Ricardo Albert.

18:00 (dulingve) Legado de poemoj (Lectura de poemas), Jorge Camacho.

19:00 Projekciado de la dokumenta filmo "The universal language", en la angla kun hispanaj subtekstoj, kaj posta kolokvo.

Oni ankoraŭ finpretigas la programon, kiu povos esti riĉigata de aliaj eroj, laŭ sugestoj de partoprenontoj. Krome, MEL planas organizi komunan tagmanĝon en proksima restoracio, kiu taŭgu por kunmemori la Tagon.

Pliaj detaloj estos diskonigitaj en venonta numero de "Nia Voĉo", kaj en la kutimaj forumoj.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Daŭras la preparado de la kongresoj kiuj dum venonta jaro estos organizataj en Hispanio, du el ili en Madrido.

Alvenas la vico de Hispana Esperantista Junulara Societo organizi **Iberian Renkontiĝon**: amuzan kaj mojosan eventon por la juna (kaj ne tiom juna) esperantistaro en la Iberia Duoninsulo. La eventon organizas laŭvice PEJ (Portugala E-Junularo), KEJ (Kataluna E-Junularo) kaj HEJS. Laŭ informoj de la organizantoj: oni povos ĝui agrablan kaj internacian etoson, bonan kunularon, diboĉajn momentojn kaj, esperenble, allogan veteron en urbo Madrido, inter la 15a kaj 17a de marto 2013.

Pli detala programo estas nuntempe pretigata, sed oni povas jam peti informojn ĉe la reta adreso: IRoMadrido2013@gmail.com. Dume, freneza invita filmaĵo spekteblas ĉe http://www.youtube.com/watch?v=Uwtpz1qDspo.

Kiel antaŭe anoncite, fine de julio 2013 okazos en Madrido internacia **SAT-kongreso**. Vidu detalajn informojn ĉe http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html kaj liston de jam aliĝintoj ĉe http://www.satesperanto.org/Aliĝintoj,2173.html.

La unuaj informoj pri la **Hispana Esperanto-Kongreso**, kiu disvolviĝos en Zaragozo inter la 3-a kaj la 5-a de majo aperas en la retejo de la zaragoza grupo "Frateco", kaj ankaŭ en tiu de HEF: http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/prezento-kongreso.

Reta aliĝo eblas per la retadreso http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/aligxo.

## PRELEGARO KAJ EKSPOZICIO EN BURGOSO

La liberecana sindikato CGT organizis serion de konferencoj en Burgoso, kun titolo "La lingvo kiel liberigilo: Esperanto" por la semajno de la 5-a ĝis al 9-a de novembro, kun jena programo:




Lundo, 5-a de novembro: prezentado de la Kultura Semajno, fare de la reprezentanto de la sindikato, sekvata de prelego "Esperanto kaj anarĥiismo", de Jesús González Jurado, esperantisto kaj CGT-ano.

Mardo, 6-a de novembro: projekciado de la filmo "1984", de Michael Radford, bazita sur la samnoma romano de George Orwell, prezentita de José Luis Barrios, filmreĝisoro, kun posta debato.

Merkredo, 7-a de novembro: "Lingva klaso, klasa lingvo", prelego-debato direktita de Juan Luis Conde, profesoro de filologio de la Universidad Complutense de Madrido.

Ĵaŭdo, 8-a de novembro, "Saluton, se habla esperanto!", enkonduka ateliero al Esperanto, sub direkto de Josu Herrarte, esperantisto kaj CGT-ano el Burgoso.

Vendredo, 9-a de novembro: "Nuno kaj estonto de Esperanto", prelego de José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.

La Semajno inkludos ankaŭ ekspozicion pri Esperanto, pretigatan de la sindikato, kiu ne nur proponas panoramon pri la historio de Esperanto kaj ĝia rilato kun la monda laborista movado, sed ankaŭ taŭgas por pripensi la gravecon de homa komunikado en homaj rilatoj, kaj la danĝeroj de la utiligo de la lingvo kiel ilo de manipulado kaj regado fare de la povo. Dum la semajno ĝi estos vizitebla en la sidejo de CGT (strato Calera, 12, Burgoso) de la 5-a ĝis la 11-a de novembro, matene de 11:30 ĝis 13:30 kaj vespere de 17:30 ĝis 19:30, kaj poste vojaĝos al aliaj urboj kie tiu sindikato havas kontaktojn.

## VIZITIS NIN

Raúl Salinas, samideano el Valencio, vizitis la sidejon de MEL la 8-an de oktobro.

La sabaton 20-an de oktobro ni ĝuis eksterordinaran Babilrondon, kun Andi Ottrok, hungara esperantistino kiu vizitis Madridon dum kelkaj tagoj.

## NOVA ADRESO DE MEL

La nova retadreso de Madrida Esperanto-Liceo estas madrid@esperanto.es. Notu ĝin por viaj estontaj komunikoj kun nia asocio.

## VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

Venonta babilrondo okazos la 3-an de novembro, sabato, je la 5,30 posttagmeze, en la Kuboplaco komence de strato Princesa, proksime al Placo de Hispanio. Probable ĉifoje la babilado okazos ene de bierejo, pro la antaŭvidebla malbona vetero. Serĉu nin en drinkejo VIPs.

Novaĵoj kaj informoj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, en retejo http://www.esperanto.es/mel aŭ en forumo http://esperanto.creatuforo.com/